EFNSW, Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016


## Kurso de Sammy Lee ĉe Esperanto Domo



Sammy Lee instruis la anglan, la indonezian kaj la mandarinan, kaj Mega Memorkursojn en Indonezio, Malajzio, Macao, Ĉinujo kaj Aŭstralio
Li faris du lecionojn ĉe Esperanto Domo kaj intencas fari 9-semajnajn kurson venontjare.

## Pica vespero ĉe Esperanto Domo






La venonta pica vespero kaj E-leciono okazos la 14-an de oktobro je la 5a ĉe Esperanto Domo.
Trevor Steele, nia gasto el Adelajdo, prezentos prelegon: "La Blanka-Aŭstralio-Politiko: ĝia naskiĝo, vivo, morto kaj releviĝo?"
Saman prelegon li prezentis en la UK en Nitra pasintjare.
Ĉiuj estas bonvenaj!

## Nia gasto



Kam Lee vizitos Sidnejon de la 31-a de oktobro ĝis la 7-a de novembro.
Li intencas viziti la Marbordan Skulptaĵan Ekspozicion kaj invitas lokajn Esperantistojn partopreni la eventon kune.



## Lingvaj Festivaloj

Ryde lingva festivalo okazis en biblioteko de West Ryde sabate la 9-an de septembro. http://languagefestival.org/ryde/
Richard Delamore prelegis pri apo Amikumu, progreso kaj planoj. Alan Libert prezentis azerbajĝanan lingvon.
La sekva festivalo okazos en Waverley dimanĉe la 15-an de oktobro. Pli da informoj: http://languagefestival.org/waverley




## Oktobra kunveno

La venonta kunveno ĉe Esperanto Domo okazos la 8-an de oktobro je la 1 ptm.

## Membrokotizoj

Dankon al ĉiuj, kiuj jam remembriĝis. Se vi ankoraŭ forgesis, ne estas tro malfrue: Iru al esperantohouse.org.au/about-us/join
Ni akceptas pagon per kreditkarto, PayPal aŭ ĝiro.

